# *En aprilo Kubo havos sian unuan milionon da vakcinoj*




**Doktoro  Vicente Vérez Bencomo**

Havano, feb 5 (RHK) La dro. SC. Vicente Vérez Bencomo, direktoro ?enerala de la Instituto Finlay de Vakcinoj (IFV) anoncis ke en aprilo ili fabrikos la unuan milionon da vakcinoj kubaj kontra? la Covid-19 en tiu centro, kio ebligos ampleksigi ties aplikon kaj evidentigi per pliaj pruvoj ties efikon.

Dum la radiotelevida programo Ronda Tablo, la spertulo emfazis ke la studoj pri la vakcinaj kandidatoj Soberana 01 kaj Soberana 02 avancas por estigi la bezonatajn antikorpojn, kiuj baros la eniron de la viruso en la ?elon.

Li precizigis ke oni esperas estigi respondon imunan por atingi tiom da antikorpoj kiom la evoluigitaj de la konvaleskantoj.

Li raportis pri la diversaj formuloj kaj fazoj de amba? vakcinaj kandidatoj kaj anoncis ke amba? estas en la etapo de eskalado kun proksimume 100 mil dozoj por realigi la fazon III de amba? variantoj.

Li komentis ke la kapacito por produkti la vakcinojn devas havi sekvojn en la lo?antaro kaj tial necesas havi sufi?e da pruvoj de ties efiko, por kio oni devas atenti la rezultojn kaj plenumi la internaciajn gvidilojn de la reguligaj organismoj. Ekzistas demar?oj por same fari studojn eksterlande.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/246829-en-aprilo-kubo-havos-sian-unuan-milionon-da-vakcinoj

**Radio Habana Cuba**